petataj aktive partopreni, ekzemple per deklamado, muziko, k.t.p. Dum la tria semajno oni faros multajn ekskursojn, aŭdos prelegojn (esperantajn) pri Danujo en la universitato, gastos ĉe membroj de la Kopenhaga Studenta Esperanto-Klubo.

Unuvorte: La programo estas treege alloga. Daŭro: de la 30a de junio ĝis la 20a de julio. Partopreni povos gestudentoj (ankaŭ de seminarioj), bone parolantaj Esperanton, aĝaj 17-32 jarojn. Specialaj fakaj kvalifikoj ne estas postulataj. Prezo: 80 danaj kronoj (£ 4). Oni mem prizorgu poŝmonon kaj la necesajn vizojn. Petu detalajn informojn kaj aliĝilon. Aliĝu baldaŭ.

Adreso: Dana Internacia Studentkomitato, La Universitato, St. Pederstraede 19, **Kopenhago, K,** Danlando.

019.941 **Bibliografio.**

=089.2=52(048) : 52(05) =945.41(471.1)

**Tähtitaivas 1949** N-ro 10, (Turku, Finnlando, Yliopisto), finnlingva astronomia gazeto mencias sian enhavon ankaŭ en Esperanto. Du artikoloj, nome pri „Preciza metodo por observi la okultaciojn" kaj pri „Nova metodo por konstrui gigantajn teleskopojn", ambaŭ de *Y. Väisälä*, la redaktoro de la gazeto, havas esperantlingvan resumon. — Turniĝanta prismo antaŭ la objektivo de teleskopo ebligas determini la momenton de okultacio kun precizeco de ± 0.03 sekundo sen rimarkinda persona eraro.

Grandaj teleskopaj speguloj povas esti farataj per muntado de pluraj malgrandaj speguloj sur fortika, sed malpeza fera skeleto.

=089.2=53(048.6) : 061.12(492).055.1

En la **Proceedings of the Koninklijke Nederlandsche Akademie van Wetenschappen** aperis ankoraŭ du artikoloj el la laboratorio por aero- kaj hidrodinamiko de la Teknika Altlernejo en *Delft* (Nederlando), nome:

*„Note on the damping of the rotational oscillation of a spherical mass of an elastic fluid in consequence of slipping along the boundary"* de prof-o d-ro *J. M. Burgers* (vol. **52** 113), kaj *„Solutions of the equations for the non-uniform propagation of a very strong shock wave"* de *W. P. Robbertse* kaj *J. M. Burgers* (vol. **52** 958). Ambaŭ artikoloj havas esperantajn resumojn.

408.9 : 408.92(023)

Aperis: **d-ro W. Manders, Interlingvistiko kaj Esperantologio,** 77 p., 242×159 mm², broŝurita. Prezo: ned. guld. 2.25; 5 angl. ŝ.; $ 0.75. Eldonis: *J. Muusses, Purmerend,* Nederlando.

**Enhavo:** Enkonduko. Interlingvistika Parto, konsistanta el tri ĉapitroj kun la jenaj titoloj:

La interlingvistiko kaj Esperanto, — La naturalismo de Edgar de Wahl kaj Otto Jespersen, — La naturalismo de IALA. — Esperantologia Parto, konsistanta ankaŭ el tri ĉapitroj: Taskoj de la esperantologio, — La evoluo de Esperanto, Lingva Korekteco, — Kompara Esperantologio.

Ĉi tiu interesa verko de samideano d-ro Manders kiu antaŭ kelkaj jaroj doktoriĝis per disertajo nederlandlingva *„Vijf kunsttalen"* (Kvin artefaritaj lingvoj), plene meritas la interesiĝon de ĉiuj seriozaj esperantistoj kaj ceteraj interlingvistoj.

Ĝi starigas grandajn taskojn al la Esperantologio, kaj elvokas interesajn diskutojn. En venonta numero de Scienca Revuo ni pli vaste diskutos ĝin.

W. P. R.